

## **Propaganda Lecture Tour**

Intopagantia Lecture forIntopagantia Lecture forMr. Baker's lecture to Mississippi, following immediately with western states, and if you would the for put on this lecture in your town you should write us MIGHT NOW. A dozen towns were missed in the spring because they wrote after the ronte in their state was closed.Offer to take a few tickets yourself, and to sell a few; enlist the co-operation of other Esperant of the spring because they wrote after the ronte in their state was closed.Mr. Baker is gring lectures on Esperant for exactly one-half the minimum fee for his other tectures, and because of the expensive printing. Correstring and correspondence necessary to manage such a tour, this amount will cover extend miles of railroad to make your town.Offer to take a few tickets yourself, and to sell a few; enlist the co-operation of other Esperant for the spring because they wrote always willing to "boost" a good lecture.Mr. Baker is gring lectures on Esperant for manage such a tour, this amount will cover extend index of railroad to make your town.Offer to take a few tickets to all ministers who are always willing to "boost" a good lecture.We guarantee a date satisfactory to you, and will not offer you a Saturday night unless you and it.Don't consider it beneath your dignity to sell only because somebody had the devotion and energy meessary to pass the subscription list.Mr. Buker is guarantee a date satisfactory to you, and will not offer you a Saturday night unless youDon't consider it be afraid of failure-energetically manageMr. Buker is guarantee a date satisfactory to you, and the devotion and energy want it.Don't consider it be afraid of failure-energetically manageMr. Buker is guarantee a date satisfactory to you, and when the town offer you a Saturday night

want it. If you will take hold of this with determination and resolution, you can add a good number of converts to the Esperanto cause in your town. Here are some general directions which we wish to offer for the management of a lecture in the ordinary town. It's for you to decide how well they will apply to yours.

HOW TO MANAGE A LECTURE. You will find in this magazine a four-pace advertisement, such as is usually used by a lec-turer's advance agent. Take this advertisement to turer's advance agent. Take this advertisement to the pastor of your leading church, or to the presi-dent of any society which is making a progres-sive fight for popular interest. Explain to him that the very best way to interest people in his work is to show his own interest in up-to-date sub-jects. Play up the entertainment feature strongly —everybody likes to be entertained, and Mr. Baker is a professional platform entertainer.

aged the lecture cannot faill Our Terms. Twenty-five dollars, payable the night of the lec-ture. We pay all travel and hotel bills and fur-nish, free except express charges, the following: Twenty-five window cards 11 x14 inches, with blank space for date, etc.; 500 distribution circu-lars, four-page, 7 x10 inches. Mimeographed ma-terial for newspaper articles. Electrotyped news-paper engravings (loaned). Tickets for reserved seats, general admission, children and complis, mentary.

seats, general consistent, the expense, lectures cost mentary. It is better to charge admission than to let a small committee stand the expense. Lectures cost something, they're worth something, and the audi-ences are seldom smaller, always better, if an admission fee is charged. People are apt to judge a thing by what it costs them. If you're interested, write or telegraph, and we'll hold the route opgn in your state as long as nossible.

Digitized by Google



Entered as second-class matter October 1, 1907, at the Post Office at Chicago, Ill., under act of March 3, 1879,

# BOOK DEPARTMENT

Prices include postage. Terms, cash with order. Add ten cents for exchange on local checks. One-cent stamps accepted for small amounts. Write orders on separate sheet—apart from correspondence on other matters. Address all letters and make all remittances payable to AMERICAN ESPERANTIST COMPANY, 708-714 EAST FORTIETH STREET. CHICAGO

## 

#### COMBINATION PRICES

#### CLUB DISCOUNTS

#### Cloth Book and Year Subscription (clubs of five) ......\$1.20

Leather Book and Year Subscription	
(clubs of five)	1.40
Paper Book and Year Subscription (clubs	
of five)	.75
Paper Books and Six Months' Subscrip-	
tion (clubs of five)	.45
Cloth Book, five or more	.75
Leather Book, five or more	1.00
The rate indicated as applying to clubs	

of five applies to subsequent orders in any quantity from Esperanto club or bona fide subscription agent.

#### SPECIAL TERMS

We supply "on sale" copies of the American Esperanto Book only, in cloth or paper binding, to the proper officer of an Esperanto elub. or to a responsible agent, remittance subject to sale; unsold copies to be returned at our demand, in good order, charges paid by shipper.


Cox Grammar and Commentary	.00
Esperanto in Fifty Lessons (Privat)	.50
The Pictorial Esperanto Course (Mann)	.35
The Esperanto Teacher (Helen Fryer)	.25
The Standard Course of Esperanto (Bul-	
len)	.25
In Cloth Binding	.50
A Primer of Esperanto (O'Connor)\$	.10
TEXT BOOKS IN ESPERANTO	150

Esperanta Sintakso	(Fruictier)	-45
First Reader (Lawre	ence)	.25.
Frazaro (Henri de Co	oppet)	-45

Karlo (a First Reader, by Edmond Privat)	.15
Komercaj Leteroj (Berthelot kaj Lam-	
bert)	,20
Komerca Sekretario (J. R. Sudria)	.20
Kondukanto kaj Antologio (Grabowski)	.60
Konkordanco de Ekzercaro (Wackrill)	.35
Kurzo Tutmonda (Emile Gasse)	.25
Lingvaj Demandoj (Zamenhof)	.25
Matematika Terminaro (Raoul Bricard).	.25
Muzika Terminaro (F. de Menil)	.20
Praktika Frazaro (Borel)	.10
Pri la Elparolado de Esperanto (Moch)	.30
Tutmonda Lernolibro por Paroligi Esper-	-30
anton	.35
House Legalibre (Kala)	

#### DICTIONARIES

Esperanto-English .Dictionary (Mot- teau)	5-
Leau)	.05
English-Esperanto Dictionary (Rhodes) English-Esperanto Dictionary (Hayes-	
() Connor)	.65
O'Connor) Vortaro de Esperanto (Kabe) Enciklopedia Vortareto de Esperanto Vorasi	1.20
Verax)	1.80
Verax) Plena Vortaro Esperanto-Esperanta (Boirae) Two Volumes	and a
Dictionnaire Esperanto-Francais	2.50
Du Mil Novai Vortai (Daulat)	.60
Du Mil Novaj Vortoj (Boulet)	.45
Universala Vortaro (Zamenhof)	.30
LITERATURE AND DRAMA	
A B C (Orzeszko-Ender) La Abatejo de Westminster (Irving-	.15
La Abatejo de Westminster (Irving-	
O'Connor)	.15
Advokato Patelin (Evrot)	.25
Aladin, au La Mirinda Lampo (Cox)	.20
Aladino kaj Palomido . (Maeterlinck-	-
Eliot) Ama Bileto (Balucki-Ender)	-25
Anatomia Vortaro (Medicina Esperan-	.15
tista Grupo)	-45
tista Grupo) Angla Lingvo Sen Profesoro (Bernard-	32.0
Moch)	.30
An Hour of Esperanto (Cart-J. B. and M.	
Cox)	.20
La Antaudiro (Charles Stewart)	.20
Aoro (Esperanto Stenography)	.15
Aspazio (Svjentokovski-L. Zamenhof)	75
La Avarulo (Moliere-Sam Meyer)	.25
Aventuroj de la Kalifo (Cox)	.15
Barbiro de Sevilla (Beanmarchais-Meyer)	
Bardell Kontraŭ Pickwick (Dickens-Mor-	.30
rison)	20
Boks kaj Koks (Morton-Stewart)	.20
Bona Sinjorino (Orzeszko-Kabe)	.10
Brazilio (Backheuser)	-35
Bukedo (Lambert)	.65
Cent Dek Tri Humorajoj (Loira)	
Cikado de Formikoj (Labiaka bai	.15
Cikado ĉe Formikoj (Labiche kaj Legouve)	
Legouve)	.20



ARTHUR BAKER-HUMORIST Google

## ESPERANTO



ERYBODY has heard something about Esperanto, the language which is so much easier to learn than any other, and which, it is expected, will one day be the only <u>secondary</u> language for all people. That is, the French will know French and Esperanto, the English their own language and Esperanto, the

Japanese will know theirs and Esperanto, and in this way the whole world will possess a common, mutual, secondary language. Just what progress the idea has made; what world congresses have been held, where thirty or forty nations joined in the use of this one tongue; how international magazines and hundreds of books are already printed in Esperanto-- these and many other phases of this fascinating subject are discussed in a lecture by Arthur Baker, who for some years has taken a leading part in the propaganda of the international language idea in America. As the author of books and pamphlets on the subject, and editor of the magazine, "Amerika Esperantisto," Mr. Baker is especially well qualified to speak about Esperanto.

His style of lecture mingles instruction with entertainment. On the theory that it is not what an auditor hears, but what he remembers, that counts, Mr. Baker holds the attention of hearers by an unceasing display of verbal fireworks. He radiates wit and humor of the most refined type.


Mr. Baker has been declared by more than one eminent critic to be the best lecturer in America. He does not pound the pulpit nor yell; his voice is never louder than just enough to be heard clearly in the farthest corner of the room. His personality is so unobtrusive that he may correctly be said to disappear behind his sentences.

Under cover of the entertainment you are convinced that this new language is worth learning. Incidentally, Mr. Baker gives a short lesson, and may even sing a song in Esperanto.

Cordially yours.

## THE MANAGERS

Digitized by Google



## ANTAŬPAROLO

Car la Tutmonda Jarlibro, kiun ni preparis por la jaro 1913, aperis nur en la monato Aŭgusto de tiu jaro, ni decidis, ke ĝi portos la datojn 1913-1914, kaj ke nova eldono de tiu libro ne aperos dum la jaro 1914. Tamen, ĉar jam en Septembro 1913, tio estas baldaŭ post la apero de la libro, ni ricevis sufiĉe multajn dokumentojn por la estonta eldono, ni konsciis, ke la personoj, kiuj kutimas uzi la Tutmondan Jarlibron, estus tre ĝenataj, se ili devus atendi ĝis la apero de la eldono por 1915. Ni do petis pluan materialon de la naciaj societoj kaj de niaj korespondantoj, kiuj plej afable sendis ĝin al ni. Ni do decidis publikigi la jenan aldonon. Ĝi estas sendota al ĉiuj aĉetintoj de la Tutmonda Jarlibro 1913-1914, kontraŭ respondkupono, kaj senpage aldonota al la ankoraŭ nevenditaj ekzempleroj de tiu libro. La prezo de la Tutmonda Jarlibro Esperantista 1913-1914 restas fiksita je Fr. 3,50 (Sm. 1,400).

Se en tiu ĉi aldono troviĝas ankora ŭ kelkaj mankoj, niaj gesamideanoj bonvolu konsideri, ke ni estas nur homoj, kaj sekve eraremaj, kaj ili volu esti indulgaj. Ni faris ĉion eblan por ke ĉiu ŝanĝo estu notita.

La korektita oficiala parto aperis aparte sub la titolo : Fundamentaj dokumentoj 1914, kaj estas aĉetebla je la prezo de Fr. 0,25.

La Tutmonda Jarlibro por 1915 aperos je la fino de Majo 1915, sed ni akceptos la materialon nur ĝis la fino de Marto de la sama jaro, ĉar la kunmeto kaj la korekto de la presprovaĵoj postulas multe da tempo, precipe kiam oni havas multajn aliajn aferojn por fari samtempe, kaj ni deziras ke la libro aperu plej akurate je la fiksita dato.

"Al niaj kunlaborintoj, kaj al niaj kunlaborontoj, kiujn ni deziras kiel eble plej multenombraj, ni esprimas plej sincerajn dankojn.

Plej speciale ni dankas : S<sup>rojn</sup> Prof. Christaller, el Stuttgart; Fessenden, Newton Centre (Mass.); Prof. R. Friedrich, Prostejon; Tellini, Bologna, pro la tre ĝustaj korektoj senditaj.

Por la Redakcio de la Tutmonda Jarlibro Esperantista,

E. FERTER-CENSE.

Digitized by Google

plafono, kaj marmora statuo de Kristo diranta "Venu al mi, lacigitaj, kaj mi vin refresigos," kopiita laŭ Thorwaldsen. Sed la plej bela estas la Sigismunda kapelo, en plej pura kaj plej bela renesanco "de tiu flanko de Karpatoj," farita de Bartolomeo Berecci. Sur muroj troviĝas subtilaj skulptaĵoj de floroj kaj fruktoj, faritaj de Cina de Sienna kaj donantaj al la kapelo aspekton de agra-Tomboj el ruĝa marmoro bla freŝeco. reprezentas dormantan Sigismundon la Maljunan, kaj Sigismundon Aŭguston, reĝojn de ora jarcento de pola historio. Ekstere la kapelo estas dike orita. Sur kontraŭa flanko troviĝas la tombo de reĝino Hedvigo, el blanka marmoro, skulptita de Antoni Madejski, kai baroka kapelo de S-ta Joahimo kun monumentoj de krakovaj episkopoj. Sek-vantaj: kapelo de Johano Baptisto (XVIa jarcento), kapelo de S-ta Andreo kun renesanca tombo de reĝo Johano Olbraht. Kontraŭ tiu kapelo troviĝas monumento de reĝo Kasimiro la Granda (1330-1370), kies bela marmora baldakeno enhavas bluan plafonon kun oraj steloj.

Malsupre ĉirkaŭ la tombo troviĝas homoj en mezepokaj vestoj, plorantaj la reĝon dum kies regado komencis disvolviĝi industrio kaj komerco en Polujo.

Malantaŭ la ĉefaltaro troviĝas tri kapeloj: de episkopo Tomicki kun lia renesanca orita tombo, de reĝo Batory, malluma kun vitraĵoj de lia patrono S-ta Stefano kaj kun barokaj skulptaĵoj, kaj de S-ta Katarino. En la maldekstra navo estas granda nigra kruco kun arĝenta fono, mirinde savita dum diversaj militaj invadoj. Tie trovas sin piedingo de Kara Mustafa, el la batalo apud Vieno en 1683. En la sama navo troviĝas sarkofago de reĝo Vladyslav Lokietek (1333). Proksime de ĝi troviĝas arĝenta ĉerko kun mortrestaĵoj de S-ta Stanislavo (kiun mortigis en Krakovo reĝo Boleslavo la Kuraĝa), kun scenoj de mirakloj post lia morto.

Sub la preĝejo troviĝas katakomboj kun ĉerkoj de polaj reĝoj kaj naciaj herooj. Interalie ripozas tie la mortrestaĵoj de Tadeusz Koŝciusko, kies nomo estas konata al usonanoj, ĉar li estis adjutanto de Washington (1777-1786), kaj heroe batalis pro sendependeco de Usono.

Neeble estas priskribi en tia konciza artikolo ĉiujn vidindaĵojn de nia urbo. La esperantistoj partoprenontaj en la Oka Kongreso, kaj precipe la usonanoj, estos surprizitaj trovi en Krakovo multegon da antikvaĵoj, el kiuj pli ol unu estas unika en Eŭropo. Vi vidos ĉe ni ekstreme interesajn monumentojn de mezepoka arhitekturo, el kiuj kelkaj devenas eĉ el la XIa jercento, kaj tre bone konserviĝis malgraŭ la detrua influo de la tempo.

Mi ne troigas, asertante ke ĉe ĉiu paŝo, en ĉiu strato kaj strateto vi renkontos multe da antivaĵoj, indaj esti montritaj kaj klarigitaj.

Venu do grandare al la Oka Kongreso, kaj vi certe ne bedaŭros vian vojaĝon!

> ANTONIO CZUBRYNSKI, Krakovo, Polujo.

#### A SUGGESTION.

If you found the above article interesting (as you surely did), why not help some non-esperantists to enjoy it also?

2

Translate it into English, and take (or send) your translation to the editor of your local paper or some other publication in which you have especial interest. Preface it with an introduction something like this:

An article on the capital city of Ancient Poland, written especially for the American magazine AMERIKA ESPERANTISTO by a resident of that city, Mr. Antonio Czubrynski, has seemed to me so interesting that I made an English translation of it which I submit herewith, so that if you can give it space your ' readers may have an opportunity to enjov ft. even though they can not all read it in the? original Esperanto. This interesting city, comparatively little known to American tourists, is of especial interest now, because next August the big Eighth Esperanto Congress will take place there. A number of Americans are planning to attend, visiting many of the chief cities of Europe en route, but even for those of us who can not go on this trip there is pleasure to be had from reading articles about the places to be visited, and above all the "Congress City" itself, such as I offer herewith.



## La Unua Ĝustatempa Manĝo

#### de Zona Gale.

ENSU kiel strange ŝajnis ĉio, antaŭ ol monatoj, semajnoj, tagoj, horoj, minutoj kaj sekundoj estis kalkulitaj! Ekzemple, se la pratempuloj volis ekscii kiam okazis io, kompreneble ili ne posedis la vorton "kiam," nek respondon. Neniu sciis kiom da tempo oni devus boligi ovon, aŭ baki panon. Por matenmanĝa horo, ili devis simple sidiĝi kaj atendi ĝis kiam la nutraĵo estos preta. Plej bedaŭrinde el ĉio ĉi, la pratempuloj eĉ ne sciis ke oni ne devus malspari la tempon! Pro tio, ke ili ne povis ĝin mezuri, kompreneble ili ne rimarkis kiel rapide ĝi preterpasas; kaj eble ili opiniis ke ili rajtas ĝin uzi tiel, kiel placas al ili, anstataŭ difini diversajn partojn por diversaj celoj,-unu parton por dormado, alian por laborado, la ceterajn por ekzercado, amuzado, k. t. p. Neniu sciis pri naskotagoj, kaj neniu povis komenci rakonton per la vor-toj "En antikva tempo." Vere, ĉio estis mirige miksata!

an sa manth

Nu, ĉirkaŭ tiam (sed, kompreneble, ili ne sciis pri "tiam") pratempa patrino unu matenon diris al sia pratempa filineto: "Nun, filino, praktiku, kaj poste vi rajtos vin amuzi."

Nek je fortepiano praktikis la filino, nek je orgeno. Šia muzikilo estis bela tubsimila trablovilo, simila al paŝtista fluto; kaj ĉiam post matenmanĝo la pratempaj knabinetoj sidiĝis sur rokoj en la pejzaĝo kaj praktikis.

Či tiu knabineto prenis siajn flutojn kaj, sidiĝinte sur roko, ŝi praktikis tiom da tempo, kiom laŭ nia nuna scio (sed ŝi ne sciis) estas kvin minutoj. Tiam ŝi envenis en la kavernon kaj jetis siajn flutojn sur la liton el feloj, rememoris ke tio estas malprava, kaj ilin pendigis ĉe ilia propra loko, super la fajrujo. Ŝi tiam sin turnis por eliri el la kaverno, sed la patrino, kuirante viandon antaŭ la fajro, revokis la filinon.

"Filino mia," ŝi diris, "ću vi forgesas ke vi devas praktiki?"

"Mi ja praktikis," respondis la knabino. "Sed praktiku, kaj praktiku!" diris la patrino, ne sciante kiel klarigi ke la infano devus praktiki tutan horon. La patrino ne konis horojn, tamen ŝi sciis per siaj sentoj kiam la filino sufiĉe longe praktikis.

Denove la knabino eksidis sur roko, kaj denove ŝi praktikis,—proksimume kvin minutojn. Tiam ŝi ree envenis la kavernon, ĵetis siajn flutojn sur la liton el feloj, rememoris, prave ilin pendigis, kaj ree estis elironta el la kaverno. Duan fojon la patrino ŝin revokis:

"Filino mia," diris la patrino, "cu vi deziras ke ree via patrino estu devigata vin atentigi?"

"Vere, ne, patrino," respondis la knabino.

"Do, praktiku, kaj praktiku kaj praktiku!" diris la patrino. "Se vi altkreskos, ne lerninte kiel muziki, kion oni pensos?"

Ree la infanino iris al sia pentrinda roko. Tio okazis ree kaj ree, ĝis kiam ŝi estis praktikinta tiom da tempo, kiom laŭ nia nuna kalkulo estas tuta horo.

Kompreneble tiu ĉi konstanta ripetado, kune kun la ordigado de la kaverno, kaj la kuirado, estis premanta laborado. Tial la pratempa patrino decidis ke ŝi konsiliĝos kun sia edzo.

Kiam la suno staris super la ĉielo, kaj ekzistis neniom da ombraĵo, kaj kiam la bruna kaj bonodora viando estis kuirita kaj duonkovrita de aromaj herboj, la virino eltiris el la cindroj la legomojn, kaŝis la deserton (ĝi estis "surprizo"), preparis antaŭ la kaverno ebenan rokon anstataŭ tablo, kaj ornamis sian kapon per folioj. Tiam ŝi kaj la knabino sidiĝis por atendi ĝis kiam venos la edzo kaj patro.

Forpasis la momento, kiun ni nun nomas tagmezo. Forpasis horo kaj alia, tiam ankoraŭ pli multaj horoj. Forpasis la posttagmezo kaj frua krepusko, sed ankoraŭ ne venis la viro. La knabino ploris pro malsato; glacie malvarmaj fariĝis la viando kaj legomoj; kaj sen rideto, atente rigardante en spacon, sidadis la pratempa edzino kaj patrino.

Guste kiam la luno pendis super la



ŝi metis ilin sur seĝon, kie jam pendis mia jako. Diable malrapide ŝi daŭrigis siajn misterojn de senvestado, baldaŭ alvenante al tiu parto de la afero, kiam estis mia devo aŭ sveni aŭ spiregi. Mi ne havis sufiĉe da forto por spiregi, tial mi pacience atendis la perdon de konscio.

Mi estis irinta nur malgrandan distancon laŭ la vojo al nekonscio, kiam mi estis abrupte revokata al aferoj fizikaj. Si alproksimiĝis al mia lito. Per voĉo kiel fagota arpeĝo en ia batalmuziko de Wagner, ŝi rompis la teruran silenton.

Wagner, ŝi rompis la teruran silenton. "Kion je infero vi rigardas?" ŝi ekkriis. "Kio estas al vi? Vi ja aspektas kiel kadavro. Jen! Prenu trinkaĵon!" Kaj, el siaj vestoj ŝi eltiris botelon, kiun ŝi donis al mi. "Prenu trinkaĵon!" ŝi ree diris. Kaj mi tutkore obeis ŝian ordonon.

Ekzamenado, helpate de sperta palato, montris al mi ke la enhavo estas viskio; kaj se iam mi englutis trinkaĵon nur por medicinaj intencoj, tiu estis la okazo. La likvoro estis je malalta fluo kiam mi redonis la botelon al ŝi, kaj ŝi baldaŭ malaperigis la restaĵon, murmurante ion pri la malbonega kvalito de kampara viskio.

Si baldau fariĝis tre parolema, sed mi ne povis facile kompreni la interrilaton inter malbona viskio, blasfemaj esprimoj, kaj cirkasa princino. Kiam ŝi ankoraŭ estis en pitoreska stato de la duonvestigo, ŝi levis siajn belajn manojn al sia kapo,—kaj demetis sian abundan hararon, tre zorge metante ĝin sur la tablo. Ĝi estis peruko!

Neniam ree mi eniris la malgrandan tendon, se mi ne havis tie gravan aferon. Kiam mi eniris, la princino ridetis al mi, sed neniel kiel antaŭ tiu okazplena nokto en M—.

La "princino" estis Sinjoro Himmelmann, virinpersoniganto iom fama antaŭ dudek kvar jaroj.

El sia angla originalo tradukis JOHN L. STANYAN.

## Krakovo

#### ĜIAJ MITOJ KAJ VIDINDAĴOJ.

#### (Speciale Verkita por AMERIKA ESPERANTISTO)

REMDULOJ malmulte scias pri slava kulturo, malgraŭ tiel nomitaj "internaciaj" rilatoj. Oni povis aŭdi dum la Sepa Kongreso, ke "Krakovo enhavas nenion interesan," kaj "oni ne scias, kial oni ĝin elektis kongresurbo." Ne pretendante elĉerpi la temon, mi volas nur al vi prezenti ion, el kio vi povos ekkoni, kiel falsa estas tia opinio.

Meze de Krakovo, apud bordoj de Vistulo, kies nomo signifas en sirjena lingvo riveron, staras kastelo, nomata *Wawel*. Kiel vi facile rekonas, ĝi estas identa kun la nomo *Babel*, renkontata ne nur kiel riĉa urbo de antikva Mezopotamio, sed ankaŭ en norda Eŭropo kaj ĝenerale en landoj de hinda-eŭropa loĝantaro. En mitaj tempoj vivis tie drako nomita Olofago (ĉiomanĝanto), kiun mortigis du filoj de la kastela princo, doninte al ĝi bovojn ledajn ŝtopitajn per sulfuro. Tiujn ledajn bovojn manĝis la drako, kaj sufokiĝis de fajro, kiun eksplodigis la sulfuro. Al kadavro de la drako alflugis korvoj kaj de ilia grakado estis la kastelo nomita *Krakuw*. En kaŝuba lingvo, korvo (pole kruk) estas nomata krak. La pli juna filo de la princo, enviante sian pli aĝan fraton, mortigis lin, sed kaŝis tiun faron, dirante ke drako formanĝis la fraton. Post la morto de la maljuna princo, kiu estis nomita Krakus aŭ Grakkus, suriris la tronon lia krima filo.

Sur Wawel ni povas vidi ĝis la hodiaŭa tago kavernon de Drako, kaj la tempon de la regado de Krakus oni fiksis je la jaroj 730-750. Al li oni volis atribui la unuan konstruaĵon de kastelo, kaj la nomon de urbo grupiĝinta ĉirkaŭ la kastelo. Same nomas la urbon la araba geografo el la XIa jarcento, Al-Bekri, en kies kroniko ni por la unua fojo renkontas historian citon pri Krakovo.

Drakon, korvon, oni ankaŭ trovas en aliaj mitologioj, same kiel du fratojn el

b /1

kiuj unu mortigas la alian.

Sur la Krakova Ĉefplaco staras preĝejo de Sankta Mario, havanta du turojn de malsama alteco kaj amplekso. Ili estis konstruitaj de du fratoj laŭ jena kontrakto: kiu konstruos pli altan turon, tiu edziniĝos kun fraŭlino, en kiun ambaŭ enamiĝis. La pli juna frato konstruis turon, sed baldaŭ rimarkis, ke ĝi estas malpli alta, ol la turo de lia frato. Li mortigis la fraton. La tranĉilo, kiu servis kiel mortigilo, oni pendigis por memoro en la draphalo (granda malnova konstruaĵo sur la Ĉefplaco), kie oni povas ĝin vidi ĝis la hodiaŭa tago.

Tiun historieton oni povas unuigi kun la antaŭa, kaj kun la roma legendo pri Romulus kaj Remus, kun la mito pri la ĝemeloj Kastoro kaj Polukso, el kiuj la dua estis senmorta, aŭ kun la litovaj dunaskitoj Lelum kaj Polelum, brilantaj en la ĉiela zodiako kiel konstelacio, per kiu komenciĝadis la nova jaro, 4,000 jarojn antaŭ nia epoko. Sed tio nuntempe estas supozo, kiun oni ankoraŭ devus pruvi, kolektinte pli grandan materialon.

Krakus havis filinon Wanda. Si ne volis edziniĝi kun germana kavaliro Rydygier, kaj dronigis sin en Vistulo. le sia memoro oni aranĝas ĝis la nuna tempo tiel nomitan "florkronfeston," fine de junio. En fiksita tago, kiam vesperiĝas, kolektiĝas apud Wawel sur ambaŭ bordoj de Vistulo dekmiloj da personoj. Tie knabinoj jetas sur la akvon florkronetojn, fiksitajn sur breto kun brulanta kandelo en la mezo. Tiu knabino, kies kroneto ne dronos, edziniĝos en tiu jaro. Nun tiu festo perdis sian antaŭan idolanan aspekton, kaj estas aranĝata lukse, kun artaj fajraĵoj kaj dancoj en krakovaj vilaĝaj kostumoj, sur remŝipoj.

La nomo Wanda estas mitologia, kaj troviĝas en kelta kaj irlanda lingvoj. Ĝi estas konata en Kimrujo kiel *Little van Lake*. En irlandaj mitoj Fand' signifas diinon, kies historio kuniĝis kun historio de suna heroo. Proksime de Krakovo estas "Termonteto de Wando," same kiel de Krakus. Similajn oni montras en Skandinavujo. La nomoj Venezio, Vendée enhavas saman vortradikon, troveblan en diversaj mitologioj.

Alia festo estas nomata Konik Zwierzyniecki ("Cevaleto de Zwjeĵunjec), kaj okazas je 28a de junio ĉiujare. Ĉirkaŭ

la jaro 1281, dum regado de Leŝek la Nigra, invadis Tataroj Polujon kaj alvenis ĝis Krakovo, detruante ĉion dum-En kriza momento unu flosisto voje. kuraĝigas siajn kamaradojn, batalas kontraŭ la barbaroj kaj en triumfo revenas en la urbon kiel venkinto, ĝoje salutata de la savita loĝantaro. Por memoro oni festas tiun invadon post katolika procesio, la 28an de junio. El la antaŭurbo Zvjejunjec invadas Krakovon viro tatare vestita, sur ligna cevaleto, cirkaŭita de tatare vestitaj muzikantoj kaj halebardistoj kun mahometanaj duonlunoj sur la ĉapeloj. Per bastonego li batas la forkurantajn geknabojn, kaj alveninte antaŭ la episkopa palaco, li salutas ĝin per kliniĝo de standardoj kaj poste revenas al festeno, kie lin atendas abunda regalo.

Sed forlasante la krakovajn mitojn, el kiuj mi nur la ĉefajn elektis, kaj kiujn la kristanismo bedaŭrinde tiel forpelis kaj detruis, ke oni eĉ ne scias kiel malaperis la bela slava mitologio, ni vizitu la plej gravan vidindaĵon de Krakovo, la reĝan kastelon.

Sur *Wawel* staras kastelo de iamaj reĝoj de sendependa Polujo, kiun oni forstrekis el politika karto de Eŭropo, kvankam ĝia kulturo vivas kaj disvolviĝas. Kun la kastelo estas ligita la katedralo konstruita en gota stilo. Preskaŭ ĉiujn stilojn oni povas tie vidi laŭ jarcentoj de historio.

Enirante la preĝejon tra baroka portalo ni vidas flanke ripojn de mamuto, kiujn oni en mezepoko klarigadis kiel restaĵojn de antaŭdiluvaj pekuloj, kaj surpendigis antaŭ la preĝejoj por edifi kristanan popolon pri la justeco de punanto Dio.

En la preĝejo pendas ambaŭflanke tapiŝoj kiujn reĝo Johano III Sobieski, apud Vieno en jaro 1683, prenis el turkaj tendaroj post la venko. Post tiu batalo restis diversaj legendoj ĉe la popolo, ekzemple, ke Sankta Virgulino mortigis turkojn per ŝtonoj; ke ŝi ilin blindigis; kaj en kriado de kokoj la polaj vilaĝanoj aŭdis la sciigon pri alproksimiĝo de turkoj armitaj per pistoloj.

La unua el 18 ĉirkaŭantaj kapeloj en bizantia stilo, kun anĝelaro sur plafono, enhavas belegan gotan tombon, kun kapiteloj reprezentantaj bibliajn scenojn. Apude, blankmarmora kapelo kun orita

Digitized by Google

.4

 $\underset{unua \ amerika \ revuo}{\mathsf{MERIKA}} \stackrel{\mathsf{MERIKA}}{\sim} \stackrel{\mathsf{SPERANTISTO}}{\underset{\mathsf{De} \ \mathsf{la} \ \mathsf{lingvo} \ \mathsf{internacia} \ \mathsf{esperanto}}}$ 

VOLUMO VIII CHICAGO OKTOBRO MCMX

NUMERO III

## AN INVITATION

THIS IS FOR YOU, who, not knowing the language Esperanto, will read a part or all of the following report in English, and will glance with more or less interest at the parallel language with its strange inflections and marks, which may look to you as though some careless printer had spilled the contents of the j-box.

We offer no apology for the commonplace, everyday manner in which we have described this Esperanto Congress. Esperanto is no longer a wonder to us. It is a thing of practical, ordinary utility, like the telegraph and postage stamp and writing machine. If you ask us to wonder about Esperanto, we can only wonder how it could have remained undiscovered for so many years, and why you have not yet decided to take a very little of your valuable time and learn it.

But you are still on the wonder side of Esperanto. Then come and listen to the proceedings of this Esperanto Congress:

A Spaniard makes the opening speech —and he is understood by all; not partially nor with difficulty, but easily and completely. Russian, Scot, American, Frenchman, German, Lithuanian, Bohemian—everybody understands exactly what this "foreigner" is saying.

An American speaks—a slightly different intonation, perhaps, his vowels not so melodious as those of the Spaniard, but as before, this gathering of so many nations understands the speaker.

Now it is a Frenchman, now a Russian, now the Brazilian, or the Uruguayan, and the German—and still *everybody* understands *all* that is said.

How can it be? you ask. How can

these various peoples, some of which trace separate lines of racial ancestry back to the unbroken silence and impenetrable dark of prehistoric ageshow can they meet on ground of common thought expressed in a common language?

No space is here for an elaborate explanation. The reply is simply "Esperanto." And Esperanto is merely a simple language—simple enough to be easily learned; simple enough that when a Frenchman and a German pronounce it they can understand one another; simple enough that an English stranger, listening, could not say "this man is German," or "that one is French."

We will not offend you, reader, by assuming that you may possess a brain so dull as to form the half-witted question: "Of what use is Esperanto?" We take it for granted that the question you ask is: "What means are being used to develop the possibilities of such a language?"

Well, just propaganda—the method inseparably connected with new things in thought. We are *telling* people about it, just as we are now telling you. Clubs and societies of Esperantists all over the world are constantly ding-donging the subject into the ears of the general public, and slowly but surely the public is learning that Esperanto is no fad and no dream, but a thing of practical utility which needs to be adopted, just as the more progressive people have learned to use postage stamps and telephones.

You are cordially invited to learn the language and to join in the propaganda.

## THE SIXTH ESPERANTO CONGRESS SESA ESPERANTISTA KONGRESO

NO ONE attending the Sixth Inter-national Congress of Esperanto could doubt the world-wide strength of the propaganda for an international language. As a matter of course, on account of its distance from Europe, where the need and growth of Esperanto are, and doubtless will be for many years stronger than in America, the Sixth Congress, in Washington, was by no means as large as the previous congresses in France, Switzerland, England, Germany and Spain. But in the matter of confidence and enthusiasm it equalled them, and in the number of national delegates officially represented it greatly surpassed them. In the opinion not alone of Dr. Zamenhof, author of Esperanto, but of many others who attended the Third, Fourth and Fifth, the Sixth was in many points the best of all.

#### Twenty-two Nations

Twenty-two nations were represented in the Congress, according to the following roll:

South Africa1
England14
Australia2
Austria1
Brazil
Philippines1
France
Germany
Spain
China2
Holland
Italy1
Canada
Croatia1
Mexico
Poland
Porto Rico
Scotland2
Russia
Switzerland1

NENIU, kiu ĉeestis la Sesan Inter-nacian Kongresor povis dubi pri la tutmonda fortikeco de la propagando por internacia lingvo. Kompreneble, pro sia malproksimeco de Eŭropo, kie la bezono kaj kreskado de Esperanto estas, kaj sendube estos dum multaj jaroj pli fortaj ol en Ameriko, la Sesa Kongreso, en Washington, tute ne estis tiel granda, kiel la antaŭaj kongresoj en Francujo, Svisujo, Anglujo, Germanujo, kaj Hispanujo. Sed laŭ la rilato de konfido kaj entuziasmo ĝi egalis ilin, kaj laŭ nombro de naciaj registaroj oficiale reprezentataj ĝi multe superis ilin. Laŭ la opinion ne sole de Dro. Zamenhof, aŭtoro de Esperanto, sed de multaj aliaj kiuj ĉeestis la Trian, Kvaran kaj Kvinan, la Sesa estis en multaj punktoj la plej bona el ĉiuj.

#### Dudek du nacioj.

Dudek du nacioj estis reprezentataj en la Kongreso, laŭ la sekvanta nomaro:

Sud-Afriko 1
Anglujo14
Aŭstralio 2
Aŭstrio 1
Brazilujo 2
Filipina Insularo 1
Francujo17
Germanujo 7
Hispanujo 9
Ainujo 2
Holando 2
Italujo 1
Kanado 5
Kroatujo 1
Meksiko 3
Polujo <b>3</b>
Porto Rico 2
Skotujo 2
Rusujo 5
Svisujo 1

Uruguay3
84
Thirty-five States
In our own country thirty-five states
were represented: Alabama2
Arkansas1
California4
Colorado2
Connecticut
Delaware2
District of Columbia59
Florida1
Georgia2
Idaho1
Illinois12
Indiana
Iowa5
Kansas2
Louisiana2
Maine
Maryland15
Massachusetts
Michigan4
Minnesota
Missouri4
Nebraska1
New Hampshire
New Jersey
New York
North Carolina1
Ohio
Oregon1
Pennsylvania40
Rhode Island2
South Carolina1
Virginia
Washington2
West Virginia10
Wisconsin

From the above list we can see how wide was the representation in the Congress. Of the number in attendance, they said in Washington, where every year convene many international congresses, that they do not often see so many in attendance.

272

Every day of the Congress had something especially interesting, and it is de-

	84
Tridek Kvin Statoj.	
El nia propra lando, tridek kvin ŝtat	oj
estis reprezentataj:	_
estis reprezentataj: Alabama	2
Arkansas	1
California	4
Colorado	2
Connecticut	3
Delaware	2
District of Columbia	59
Florida	1
Georgia	2
Idaho	1
Illinois	12
Indiana	
Iowa	5
Kansas	2
Louisiana	2
Maine	13
Maryland	15
Massachusetts	18
Michigan	4
Minnesota	3
Missouri	4
Nebraska	1
New Hampshire	3
New Jersey	2
New York	28
North Carolina	1
Ohio	15
Oregon	
Pennsylvania	40
Rhode Island	
South Carolina	
Virginia	
Washington	
West Virginia	10
Wisconsin	4

Urugvajo ..... 3

272 El la ĉi-supra listo oni vidas, kiel vasta estis la reprezentado en la kongreso. Pri la nombro de ĉeestantoj, oni diris en Washington, kie ĉiujare kunvenas multaj internaciaj kongresoj, ke ne ofte oni havas tiom da kongresanoj.

Ciu tago de la kongreso havis ion aparte interesan, kaj estas dezirinde ke



sirable that we describe it somewhat in the order of occurrence. We therefore will report the affair day by day.

#### SATURDAY, AUGUST 13

THOUGH the Congress was to be officially opened on Monday, the members began to gather in great numbers Saturday. In fact the majority arrived that day, and the chief thing of interest was the traditional welcome to Dr. Zamenhof.

#### Arrival of Dr. Zanmenhof

The famous author of Esperanto arrived in Washington Saturday evening at half past four. A large number of Esperantists awaited him. They arranged themselves, with the help of the Esperantist policemen, in two long ranks, between which marched the Doctor and his wife, escorted by Mr. and Mrs. Reed, Secretary Chavet and Captain Perogordo. The crowd saluted them most heartily, shouting "Vivu Esperanto! Vivu Zamenhof!" Followed by such enthusiastic cries, they entered an automobile and were taken to the headquarters. By the same train came Colonel John Pollen, president of the British Esperanto Association, William Mann, editor of The British Esperantist, and several other prominent persons.

#### Informal Reception

Saturday evening, in one of the parlors of the hotel, there was an informal reception, and all present were introduced to Dr. Zamenhof. and shook his hand. Through long experience the Doctor himself had become accustomed to such affairs, but Madame Zamenhof had not the courage to submit to such a long line of hand-shakers, and modestly intermingled with the crowd. For two hours there was light conversation, interrupted by several informal speeches of greeting. In the end the orchestra, consisting of several players from the Marine Band, struck up "La Espero," in which those present joined with hearty good-will.

#### FIRST DAY

S UNDAY, the 14th of August, was called the first day of the Con-

oni priskribu ĝin iom laŭ la ordo de okazado. Do ni raportos la aferon tagon post tago.

#### SABATO, 13a DE AUGUSTO

K VANKAM la Kongreso oficiale estis malfermota lundon, la kongresanoj kolektiĝis grandanombre sabaton. Efektive la plimulto alvenis tiun tagon, kaj la ĉefa afero de intereso estis la tradicia bonveno al Dro. Zamenhof.

#### Alveno de Dro. Zamenhof

La fama aŭtoro de Esperanto alvenis en Washington sabaton vespere, je duono post la kvara. Granda nombro da Esperantistoj atendis lin. Ili sin aranĝis, per la helpo de la esperantistaj policianoj, en du longajn vicojn, inter kiuj marŝis la Doktoro kun sia edzino, kondukataj de Gesinjoroj Reed, Sekretario Chavet kaj Kapitano Perogordo. La amaso salutis ili plej korege, kriante: "Vivu Es-peranto! Vivu Zamenhof!" Sekvate de tiaj entuziasmaj krioj, ili eniris aŭtomobilon kaj veturis al la Akceptejo. Per la sama vagonaro venis Kolonelo Pollen, prezidanto de la Brita Esperantista Asocio, Vilhelmo Mann, redaktoro de The British Esperantist, kaj kelkaj aliaj eminentuloj.

#### Neformala Akcepto

Sabaton vespere. en unu el la salonoj de la hotelo, okazis neformala akcepto. kaj ĉiuj ĉeestantoj estis prezentitaj al Dro. Zamenhof kaj premis al li la manon. Per longa sperto la Doktoro mem kutimiĝis al tiaj aferoj, sed Sinjorino Zamenhof ne kuraĝis sin submeti al tia longa linio da manpremantoj, kaj modeste intermiksis en la amason. Dum du horoj estis malpeza babilado, interrompita per kelkaj neformalaj paroladoj de saluto. En la fino la orkestro, konsistanta el kelkaj ludistoj el la Marista Muzikistaro, muzikis "La Espero," en kio la ĉeestantoj partoprenis kun kora bonvolo.

#### UNUA TAGO

O<sup>NI</sup> nomis dimanĉon, la 14'an de Aŭgusto, la unua tago de la Kongress, although the official opening occurred Monday. Many Esperantists participated in the church services in the morning, which were held in the Episcopal Church of St. Paul. In the latter Rev. James E. Smiley gave a sermon in the international language.

In the afternoon the Esperantists investigated the city at will, going on foot, by street cars and automobiles. One company which operates tourist automobiles, the "Capital," published an interesting advertising leaflet in Esperanto, which was quite a catalogue of the sights of Washington and attracted much interest. During the whole Congress this company reserved for the Esperantists special cars, on which the announcer did his stunt in the international language, while the onlookers, as well as the riders. "rubbered" their necks at will.

#### SECOND DAY-FORMAL OPENING

ONDAY morning the Esperantists M of the various countries busied themselves in the election of delegates to participate in the formal opening of the Congress. At ten o'clock all convened in the auditorium of the Arlington Hotel. Captain Perogordo, of Madrid, as the representative of Spain, where the Congress was held last year, gave a formal greeting and declared the Congress opened, transferring the presidency to Mr. John Barrett, president of the Esperanto Association of North America. Dr. Hale, of the Bureau of the American Republics, read a letter of greeting from Mr. Barrett, in which that gentleman expressed his regret that, because of illness, he could not preside at the Congress; therefore the vice president, Dr. H. W. Yemans, accepted the presidency and made an eloquent address of welcome to the Esperantists.

Afterwards the official delegates of several nations spoke in the name of their governments. They were:

For the government of Brazil—Sro. Mello Souza.

China—Lu Ping Tien and Wu Chang. Costa Rica—Senor Joaquim Bernardo greso, kvankam la oficiala malfermo okazis lundon. Multaj Esperantistoj partoprenis matene la diservojn, kiujn oni faris en Esperanto ĉe la Katolika Preĝejo de Sankta Patriko, kaj en la Episkopala Preĝejo de Sankto Paŭlo. En tiu lasta Pastro James E. Smiley faris predikon en la internacia lingvo.

Posttagmeze oni esploris laŭvole la urbon, irante per piedoj, tramoj kaj aŭtomobiloj. Unu kompanio kiu ekspluatas turistajn aŭtomobilojn, la "Capital," eldonis interesan reklam-folion en Esperanto, kiu estas kvazaŭ katalogo de la vidindaĵoj de Washington kaj altiris multe da intereso. Dum la tuta kongreso tiu kompanio konservis por la Esperantistoj specialan ĉaron, sur kiu la anoncisto faris sian taskon per internacia lingvo, dum la rigardantoj, tiom kiom la veturantoj, "gutaperkis la kolon" laŭ sia libera volo.

#### DUA TAGO-SOLENA MALFERMO

UNDON matene la Esperantistoj de la diversaj landoj sin okupis elekti delegitojn kiuj partoprenos en la solena malfermo de la kongreso. Je la deka ĉiuj kunvenis en la salonego de la Hotelo "Arlington." Kapitano Perogordo, el Madrid, kiel reprezentanto de Hispanujo, kie okazis la Kongreso lastan jaron, donis formalan saluton kaj deklaris la Sesan Kongreson malfermata, transdonante la prezidentecon al Sro. John Barrett, prezidanto de la Esperantista Asocio de Norda Ameriko. Dro. Hale, el la Oficejo de Amerikaj Respublikoj, legis salutan leteron de Sro. Barrett, per kio tiu sinjoro esprimis sian bedaŭron ke, pro malsaneco, li ne povus prezidi la kunvenon; tial la vic-prezidanto, Dro. H. W. Yemans, akceptis la prezidantecon, kaj faris elokventan paroladon de bonveno al la Esperantistoj.

Poste la oficialaj delegitoj de kelkaj nacioj parolis je la nomo de siaj registaroj. Ili estis:

Por la registaro de Brazilujo-Sro. Mello Souza.

Ainujo- Lu Ping Tien kaj Wu Chang. Costa Rica-Sro. Joaquim Bernardo Calvo, minister at Washington.

Guatemala-Senor Francisco Latour.

Honduras-Dr. Guillaume Moncado.

Porto Rico-Mr. Negron.

Persia—Ali Kali Kahn.

Russia-Captain Postnikov.

Uruguay-Senor Leguis Munoz.

Spain-Captain Perogordo.

Mexico, Sr. Luis Ricoy.

For the War Department of the United States—Dr. H. W. Yemans.

For the Navy Department—Charles Stewart.

State of South Carolina—Virgil C. Dibble, Charleston.

State of Louisiana—J. G. Haupt, Crowley.

State of Oregon-J. C. Cooper, Mc-Minnville.

The government of Japan also sent a delegate. Mr. Mitsumatsu, but unfortunately his ship arrived somewhat late and he reached Washington after the end of the Congress.

The world-wide growth of Esperanto was well illustrated in the sending of delegates from governments of several large and important countries which had never previously been officially represented—Persia, Brazil, China, Russia, and several not so large.

After the greetings from the government delegates Dr. Zamenhof arose to make his annual address to the assembled Esperantists. They received him with great applause, which lasted for several minutes. Then he read, amid the silence of strained listening by the audience, the following very interesting speech, which is a skillful and laudable answer to some criticisms against Esperanto:

ADDRESS OF DOCTOR ZAMENHOF

L AND of Liberty, land of the future, I salute thee! Thou land of which have dreamed and still dream multitudes of the suffering and oppressed, I salute thee! Land of a people which belongs not to this or that tribe or church, but to her all her honest sons, I bow before you and am happy that fate has permitted me to see you and to breathe at least for a little while your free and unmonopolized air.

I salute thee, United States of America, most powerful representative of the new world. We Calvo, ministro ĉe Washington.

Guatemala—Sro. Francisco Latour.

Honduras-Dro. Guillaume Moncado.

Porto Rico-Sro. Negron.

Persujo-Ali Kali Kahn.

Rusujo—Kapitano Postnikov. Urugvajo—Sro. Leguis Munoz.

Meksiko, Sro. Luis Ricoy.

Hannah Kata D

Hispanujo-Kapitano Perogordo.

Por la Milita Departmento de Usono-Dro. H. W. Yemans.

Usona Stato Sud-Karolino---Virgil C. Dibble, Charleston.

Stato Louisiana-J. G. Haupt, Crowley.

Stato Oregon—J. C. Cooper, McMinnville.

La registaro de Japanujo ankaŭ sendis delegiton, Sro. Mitsumatsu, sed malfeliĉe lia ŝipo venis iom malfrue kaj li atingis Washington nur post la fino de la Kongreso.

La tutmonda kreskado de la Esperanta influo estas bone ilustrita per la sendo de delegitoj el registaroj de kelkaj gravaj kaj grandaj landoj kiuj neniam antaŭe estis oficiale reprezentitaj—Persujo, Ainujo. Brazilujo, Rusujo, kaj kelkaj ne tiom grandaj.

Post la salutoj de la registaraj delegitoj Dro. Zamenhof leviĝis por fari sian ĉiujaran paroladon al la kunvenintaj Esperantistoj. Oni akceptis lin per granda aplaŭdado, kiu daŭris kelkajn minutojn. Tiam li legis, dum la silen tego de streĉita aŭskultado de la aŭdantaro, la sekvantan tre interesan paroladon, kiu estas lerta kaj laŭdinda respondo al kelkaj kritikoj kontraŭ Esperanto:

#### PAROLADO DE DOKTORO ZAMENHOF

L ANDO de libereco, lando de estonteco, mi vin salutas! Lando, pri kiu revis kaj nun ankoraŭ revas multaj suferantoj kaj senkulpaj persekutatoj, mi vin salutas. Regno de homoj, kiu apartenas ne al tiu aŭ alia gento aŭ eklezio, sed al ĉiuj siaj honestaj filoj, mi klinas min antaŭ vi, kaj mi estas feliĉa, ke la sorto permesis al mi vin vidi kaj spiri almenaŭ dum kelka tempo vian liberan, de neniu monopoligitan aeron.

Saluton al vi, Usono, plej potenca reprezentanto de la nova mondo. Ni, filoj de la

